

Revizio propono por la Statuto de ILEI

La sekva teksto enhavas modifproponojn diskutitaj en la estraro kaj la regulara komisiono, kiuj estas proponotaj al la Komitato en Kopenhago, kaj kiuj estis anticipe diskonigitaj por diskuto. La nuna teksto estas aktualigita laŭ ricevitaj komentoj.

Sekvos revizio-propono por la Interna Regularo, kiu kompletigas la statuton. Ni estas informitaj ke modifita (tradukita) versio de la Statuto estas facile kaj moderkoste registrebla ĉe la Komerca Ĉambro en Hago; la Interna Regularo ne bezonas registriĝon.

===== modifproponoj **tiukolare** ==klarigoj **blue** =====

STATUTO

de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Aprobata dum la komitatkunsido de la 32a Konferenco, la 12an de aŭgusto 1998 en Montpellier, Francio.

Artikolo 1

IDENTECO

1.1

La nomo de la organizo estas "Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj"; mallonge "I.L.E.I.".

1.2

En la sekva teksto de tiu ĉi Statuto ĝi estas nomita "la Ligo".

Artikolo 2

DIFINOJ

2.1

La Ligo estis fondita en la jaro 1949 por nelimigita tempo.

2.2

La Ligo estas faka organizo pri edukado kaj instruado.

2.3

La Ligo estas demokratia organizo, memstara en rilatoj kun aliaj organizoj kaj institucioj.

2.4

La bazaj principoj por la Ligo estas tiuj de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj la Universala Deklaracio de la Rajtoj de la Infano.

2.5

La Ligo havas sian sidejon en Nederlando, jure rekonita de la komerca ĉambro de la Haga regiono, numero 27181064

2.6

La oficiala lingvo de la Ligo estas la internacia lingvo Esperanto.

Artikolo 3

CELOJ

La celoj de la Ligo estas:

3.1

Edukado al estimo de la homo kaj al respekto al la vivo kaj al la naturo.

3.2

Progresigo de la interkompreniĝo inter la popoloj.

Artikolo 4

TASKOJ POR ATINGI LA CELOJN

4.1

Unuigi geinstruistojn kaj instruantojn esperantistajn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn kaj por celtaŭga instruado de Esperanto.

Proponata transformo al tri punktoj, por vastigi nian vizion: tiel ke ni kunligu ĉiajn instruistojn por uzi Esperanton en siaj transnaciaj fakaj kontaktoj, ne nur por sisteme labori por la enkonduko de Eo. Tio spegulas la vortumon de la liga nomo "Esperantistaj Instruistoj" kaj ne "Esperanto-Instruistoj". Plie, ni agnoskas, ke antaŭ ol konvinke premi edukajn instancojn enkonduki Esperanton, kaj esplori pedagogiajn problemojn, ni devas okupiĝi pri demandoj de lingvo-politiko en edukado, ĉar se tio evoluas en malbona direkto, la plenumo de ĉiuj niaj aliaj celoj fariĝas ĉiam pli malfacila.

Nova 4.1:

Unuigi instruistojn kaj instruantojn esperantistajn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn kaj por celtaŭga instruado de Esperanto.

Nova 4.2:

Provizi egalecan lingvan ligilon al ĉiufakaj kaj ĉiunivelaj edukistoj kaj instruistoj por siaj translimaj fakaj kontaktoj pere de la unikaj komunikaj valoroj de Esperanto.

Nova 4.3

Studi kaj komenti kaj influi la lingvo-politikon kaj komunikajn praktikojn aplikataj al internaciaj interŝanĝoj en edukaj medioj.

4.4

Atenti, esplori kaj analizi pedagogiajn problemojn en la lingvo-instruado kaj labori por solvi ilin.

4.5

Iniciati, organizi kaj subteni sciencajn esplorojn pri la instruado de lingvoj.

4.6

Organizi interŝanĝojn de spertoj el la pedagogiaj scienco kaj praktikado por plibonigo kaj modernigo de la instruado de lingvoj, speciale de Esperanto.

4.7

Organizi diversspecajn internaciajn aranĝojn cele al interkompreniĝo pere de la internacia lingvo.

4.8

Organizi pedagogiajn konferencojn kaj laborkunvenojn.

4.9

Aranĝi internaciajn ekzamenojn pri kapablo en apliko kaj instruado de Esperanto.

4.10

Kontakti kun registaraj kaj edukaj instancoj kaj kun aliaj organizaĵoj kies celoj estas konformaj al tiuj de la Ligo.

4.11

Publikigi eldonaĵojn kaj komunikaĵojn.

4.12

Apliki aliajn leĝe permesitajn rimedojn.

Artikolo 5

MEMBRECO

5.1

Ĉiu persono kiu rekonas la Statuton, okupiĝas aŭ interesiĝas pri edukado kaj instruado, rajtas membriĝi.

5.2

Membroj distingiĝas en sekciaj membroj kaj individuaj membroj.

5.3

Fino de membreco okazas pro:

5.3.1

deziro de la membro;

5.3.2

kontraŭstatuta ago de la membro;

5.3.3

forpaso de la membro.

5.4

La membroj havas la rajton:

5.4.1

ĉeesti ĉiujn kunsidojn de la Komitato;

5.4.2

ricevi la regulan eldonaĵon de la Ligo;

Nova teksto:

5.4.2

ricevi la oficialan organon de la Ligo, ĉu en fizika; reta aŭ alia formo.

Komento: Ankau Juna Amiko estas regula eldonaĵo, sed ILEI-anoj ne povas ĝin laŭrajte ricevi. Alia formo estas ekzemple la laŭtlegata versio por blinduloj.

5.4.3

starigi demandojn kaj doni konsilojn al la instancoj nomitaj en artikolo 7.

Artikolo 6

FINANCAJ RIMEDOJ

La financaj rimedoj de la Ligo estas:

6.1

membrokotizoj;

6.2

donacoj;

6.3

rentoj kaj heredaĵoj;

6.4

aliaj enspezoj.

Artikolo 7

ORGANIZA STRUKTURO

La **kernaj** instancoj de la Ligo estas:

7.1

la Komitato;

7.2

la Estraro;

7.3

la sekcioj kaj la reprezentantoj.

LA KOMITATO:

7.1.1

estas la supera decida instanco de la Ligo;

7.1.2

konsistas el komitatanoj, kiuj estas skribe delegitaj membroj;

7.1.3

kunsidas minimume unufoje jare;

7.1.4

decidas pri akcepto kaj/aŭ ŝanĝo de la Statuto kaj de la Interna Regularo;

7.1.5

rajtas nomi kandidatojn por la Estraro;

7.1.6

elektas la membrojn de la Estraro, el kiuj la prezidanton, la sekretarion kaj la estraranon pri financoj kiel funkciulojn;

7.1.7

elektas la membrojn de la Kontrola Komisiono pri Financoj;

7.1.8

starigas kaj nuligas laborkomisionojn;

7.1.9

pridiskutas kaj prijuĝas la laboron faritan de la Estraro, de la sekcioj, de la reprezentantoj kaj de la komisionoj;

7.1.10

povas senŝarĝigi la Estraron;

7.1.11

decidas pri la sekvindaj gvidlinioj;

7.1.12

decidas pri akcepto aŭ eksigo de sekcioj;

7.1.13

povas senrajtigi komitatanon pro kontraŭstatuta ago;

7.1.14

fiksas la membro-kotizon;

7.1.15

prijuĝas la raportadon de la Kontrola Komisiono pri Financoj;

7.1.16

decidas pri oficoj plenumotaj de pagata oficisto;

Komento: Tio tro fortas. La estraro nomas kaj malnomas oficistojn; la komitato malfacile povas fiksi la taskojn antaŭ ol scii la kapablojn de la oficisto kaj la aktualajn bezonojn. Plie, necesas distingi inter oficiale dungita oficisto (ne antaŭvidebla) kaj honorariataj volontuloj (tre ebla – jam okazas).

Nova propon-teksto:

7.1.16

aprobas taskaron plenumota de pagata oficisto aŭ kompensata volontulo;

7.1.17

decidas per simpla plimulto de validaj voĉoj (escepte en la kazo nomita en 7.1.18), se minimume triono de la voĉdonrajtaj komitatanoj ĉeestas aŭ reprezentigas en la kunsido;

Komento: La kvoruma kondiĉo staru malpli kaŝite. Re-formulo dependos je la principa decido ĉu simpla plimulto sufiĉu por ŝanĝi la statuton. Kaj plie ĉu ni havu alian kvorumon por retaj voĉdonoj. Preferindus duono, tiel ke serioza nombro da respondantoj necesas; aliflanke la modesta reago al la lasta fizika voĉdono ne estas kuraĝiga. Ankaŭ 7.1.6 en la regularo postulas du-trionan voĉdonon. La suba teksto supozas, ke ĉiuj kvorumoj restas kiel nun.

7.1.17

faras decidojn laŭ kvorumo, kiu konsistas el triono de la voĉdonrajtaj komitatanoj. Tiukaze ĝi decidas per simpla plimulto de validaj voĉoj (escepte en la kazoj nomitaj en 7.1.18 kaj en 7.1.6 de la Interna Regularo)

7.1.18

decidas per minimume tri kvaronoj de la validaj voĉoj pri malfondo de la Ligo. Tiuokaze ĉiu havaĵo de la Ligo estos donacita al Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando, aŭ al samcela instituto, decidota de la Komitato.

Komento: Preferinde ne fiksi nomon de difinita organizaĵo; ILEI nun havas multajn konsidereblajn partnerojn; ne eblas antaŭvidi, kiel tio evoluos tra la jaroj.

Nova propon-teksto:

7.1.18

decidas per minimume tri kvaronoj de la validaj voĉoj en kворuma fizika kunsido pri malfondo de la Ligo. Tiuokaze ĉiu havaĵo de la Ligo estos donacita al edukaj instancoj, decidotaj de la Komitato.

LA ESTRARO:

7.2.1

gvidas la Ligon;

7.2.2

konsistas el minimume kvin kaj maksimume naŭ membroj kun trijara oficodaŭro inter kiuj prezidanto, sekretario, estrarano pri financoj, vicprezidanto kaj vicsekretario;

7.2.3

okazigas la elekton de komitatanoj nome de la individuaj membroj;

Komento: La Estraro proponas nuligi tion, ĝi neniam funkciis. Estu nur sekciaj komitatanoj por fortigi la rolon de la sekcioj. Alia eblo estus ke sekciaj komitatanoj rajtu aldoni komitatanojn pro sia aparta sperto – kiel C-komitatanoj ĉe UEA. Ekzemple unu alelektita komitatano por ĉiu plena deko da sekciaj komitatanoj. Tio administre facilas, kaj farendos en la elektojaro dum la komitatkunsido, tuj antaŭ la elekto de nova estraro. Do, nova teksto verkota laŭ la komitata opinio.

7.2.4

faras proponojn al la Komitato;

7.2.5

raportas kaj respondecas pri siaj agoj al la Komitato;

7.2.6

rajtas proponi kandidatojn por estraraneco;

7.2.7

rajtas okazigi skribajn **kaj retajn** voĉdonojn de la komitatanoj;

7.2.8

rajtas nomi kaj anstataŭigi pagatajn oficistojn por oficoj fiksitaj de la Komitato laŭ artikolo 7.1.16;

Nova teksto:

7.2.8

rajtas nomi kaj anstataŭigi pagatajn oficistojn kaj kompensatajn volontulojn por taskoj aprobitaj de la Komitato laŭ artikolo 7.1.16;

7.2.9

rajtas inviti gastojn al siaj kunsidoj kaj al tiuj de la Komitato.

SEKCIOJ KAJ REPRESENTANTOJ.

7.3.1

Sekcio agas en difinita teritorio.

7.3.2

Sekcio povas esti fondata de minimume kvin membroj en difinita teritorio.

Komento: Necesas postuli, ke la difinita teritorio devas esti identa kun tiu en 7.3.1! Lau la nuna regularo sekcio povas agi en gronlando kaj esti fondita per kvin membroj en nov-zelando! La komitato jam decidis, ke temu pri internaciaj membroj.

7.3.2

Sekcio povas esti fondata de minimume kvin membroj en tiu difinita teritorio, kiuj devas fariĝi en la jaro de la peto-ektrakto internaciaj membroj de ILEI.

7.3.3

Sekcio nomas sekcian estraron, el kiu unu kiel sekciestron.

7.3.4

Reprezentanto reprezentas la membrojn en teritorio sen sekcio.

7.3.5

~~Sekcioj kaj reprezentantoj nomas komitatanojn.~~

Komento: Nur sekcioj! Neniam estis rajto de reprezentanto. Se ni konsentos pri la ekstraj komitatanoj pro fakaj kapabloj, reprezentantoj (kaj aliaj) rajtus proponi kandidatojn – au ech mem kandidatighi.

7.3.6

Sekcioj kaj reprezentantoj rajtas fari proponojn al la Komitato kaj rajtas nomi kandidatojn por la Estraro de la Ligo.

7.3.7

Ili respondecas al la Komitato pri ĉiuj siaj agoj koncerne la celojn de la Ligo.

Artikolo 8

LA ADMINISTRA JARO

8.1

La administra jaro egalas al la kalendara jaro.

Artikolo 9

REGULAROJ

9.1

Al tiu ĉi Statuto apartenas Interna Regularo, Elektoregularo, Konferenca Regularo kaj eventualaj aliaj regularoj kaj gvidiloj.

9.2 La Statuto kaj la Interna Regularo devas esti publike afiŝataj; gvidiloj validas nur se ili estas publike afiŝataj. Ĉiu ŝanĝo de la Statuto kaj Regularoj devas esti registritaj en la publike afiŝataj dokumentoj.

Komento: Ni tiel difinas la triopon, Statuto, Regularoj, Gvidiloj. Kiu rajtas ŝanĝi, starigi, nuligi tiujn, kaj laŭ kiuj kondiĉoj estu en la regularo. La orda notado de modifoj estas motivita pro la malfacileco nun spuri ŝanĝojn faritaj en 2002, 2003 kaj 2006. Publike afiŝata praktike signifas: legebla en retpaĝo.

=====

Sekvos ŝanĝproponoj por la INTERNA REGULARO.

SMG 30 Majo, 2011/aktualigo 28 junio SMG